

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

Finita, forpasinta estas la Leipziga kongreso en la momento, kiam aperas tiuj ĉi lintoj. Kun ĝi la tuta streĉita intereso, kiun alportis al tiu unufoja okazo dum jaro la tuta SAT-anaro kaj precipe la legataro de "S-ulo", kiu ĉiam kaj ĉiam denove estis atentigata al tiu brila punkto en la antaŭeniore de nia movado. Nia celo, la praktika aplikado kaj utiligo de esperanto, ĝi fariĝas en la kongreso palpebla efektivo, ĝi ricevas tie sencon realan kaj konkretan esprimon. Tial la someraj monatoj por ni ne signifas malstreĉigon, paŭzon, lacemon. Ni rimarkis, ke la semajna gazeto de la neŭtraleburga esperantistaro "Heroldo de Esperanto" en la someraj monatoj iom malstreĉis siajn fortojn, montris signojn de ripozemo, aperante en pli malgranda amplekso.

Sed por "S-ulo" la someraj monatoj ne signifas interrompon en la varbado, en la fortostreĉado. Por ni tiuj monatoj signifas rikoltadon el la vintre komencitaj kursoj, alkonduko de l' novlernintoj en niajn grupojn kaj rondojn — kaj, precipe, abonigo de l' plej progresintaj inter ili al "S-ulo". Ni bezonas tiujn freŝajn rezerveojn, ĉar ventegoj malhelpas nian antaŭenmarŝadon. Unu post la alia, ni perdas niajn abonantojn en blankaj teritorioj pro registaraj malpermesoj: Italio, Litovio, Bulgario, Rumanio, sekvis Hungario kaj laste Polio.

Kia estu nia respondo al tiuj minacoj? Pli intensa varbado en la cetera mondo. Pro la terhoraj landoj ni ĝis nun ne povis tute ĝisatingi abonant-staton de 4000, staton, kiu sole certigas la regulan aperigadon de 12-paĝa gazeto. Ni ne volas riproĉi al niaj K-doĵ pro malaktiveco. Ni scias, ke multaj inter niaj legantoj faras sian plej-eblo por fortiĝi "S-ulo"-n. Ni konas la multajn internajn kaj eksterajn malfacilojn kaj kontraŭstarojn, kiuj baras al pli rapida disvolviĝo de nia movado. Sed ni tamen direktas al ĉiuj la peton: Post la someraj tagoj, post la kongreso, elprovinta la fortojn de nia organizo — ne ripozu, ne ekhaltu! Baldaŭ "S-ulo" eniros sian 6-an vivjaron. Ke ĝi

Helpu, Kamaradoj!

La nacia kongreso de la "Federacio de Liberpensuloj Franclingvanaj okazos en Grenoble (Isère), Francio, de 14-a ĝis 16-a de septembro. Interalie la tagordo entenas ankaŭ la temon "Esperanto kaj la liberpensuloj". Por konvinki la multnombrajn delegitojn, ĝis nun malfavorajn al esperanto, estas necese montri al ili taŭgajn materialojn por dokumenti la utilon, valoron kaj neceson de nia lingvo. Pro tio sendu salutleterojn, mallongajn poresperantajn alvokojn kaj materialon por la ekspozicio. Rekompence ĉiu ricevos vidaĵon.

Ĉion sendu al K-do, J. Coll, Hotel Lesdiguière, 198 Cours J. J., Grenoble (Isère), Francio.

La Protokolo

pri nia fakkunsido de liberpensuloj dum la IX-a SAT-Kongreso en Leipzig aperos proksiman monaton.

komencu ĝin kun pligrandiginta abonantaro kaj fervora, objektivite raportanta kunlaborantaro. Tio certigos al nia "S-ulo" fundamenton de ekzisto kaj pluan prosperadon pli grandiozan ol ĝis nun. N. B.

LA SAT-APARATO SERVAS!

Antaŭ kelkaj semajnoj K-do Johanson el Stokholm anoncis veturon al Bruselo (Bruxelles) de K-do Nilsson, tramisto. Ĉiujara loterio estis indikinta lin por ricevi de la tramkompanio vojaĝan stipendion, kiel okazas al pluraj tramistoj. Jes, tiu entrepreno — cetere komunuma — okaze de sia kvindekjara jubileo starigis specialan kapitalon, kies rentumo servu por pagi la elspezojn de tramistoj, kiuj emus fari fakan studvojaĝon eksterlande. Okaze de tro alta nombro de amatoroj la loterio funkciis. Tiele okazis, ke K-do Nilsson vizitis nian urbon. Nia grupo komisiis K-don Lebacqz aranĝi la tutan aferon, kaj li tion majstre plenumis. Prizorgo de hotelo, vizito al la urbo, al tramdeponejoj, laborejoj kaj substacioj elektraj estis aranĝitaj kun helpo de K-doĵ Van Floof kaj Masson. Ili ankaŭ kompreneble vizitis la sindikaton, kie K-do Nilsson ricevis multan profesian materialon kaj estis dokumentata laŭ laborista vidpunkto.

La 25. julio la sindikato organizis publikan kunvenon, dum kiu K-do Nilsson parolis esperante pri la vivo de Stokholma tramisto, klarigante liajn labor- kaj sociajn kondiĉojn. Ĉeestis proks. 100 personoj. Post la franc- kaj flandralingva tradukoj la intereso fariĝis tiom granda, ke multaj demandoj alfluis kaj ke sindikata diskuto estiĝis.

Fine la sindikata sekretario, je nomo de sia organizo, esprimis sian ĝojon pri la parolado de K-do Nilsson; inter aliaj diroj li forte akcentis pri la granda rolo ludita de esperanto; li promesis pli forte helpi nian movadon kaj petis, ke K-do Nilsson transdonu la fratajn salutojn de Bruselaj transindikatoj al iliaj Stokholmaj klasfratoj. Tiujn varmajn parolojn K-do Van Aelst tradukis esperantlingven antaŭ interesplena atento de la ĉeestantaro, grandparte neesperantista. K-do Nilsson estis vizitonta Antverpenon, kie sub gvidado de K-do Verhulst li certe trafis bonan akcepton.

Resume, bonega sindikata kaj peresperanta propagando. M. V. A. (155).

FOR LA NEŬTRALISMO!

En la aŭgusta eldono de la oficiala gazeto de Brita Esperantista Asocio (B. E. A.) estas enpresita letero, kiun sendis la 12-an de junio Ĝon Merĉnt (John Merchant), ĝia prezidanto, al eksĉefministro Bolduin (Baldwin), ĉar ĉi lasta je la 16-a de majo, laŭ raporto, diris:

"Mi opinias, ke la praktikaj gvidantoj de la socialismo, distinge de la teoriuloj,

lernas per spertoj, ke ekzistas aferoj, kiujn la brita popolo neniel volus akcepti. (Aplaŭdoj.) Mi opinias, ke ili tiel facile povas konvinki la popolon ŝtatigi la bankojn, kiel devigi ĝin lerni esperanton. (Ridado.)"

La prezidanto responde skribis: — "Ili, la anoj de BEA, konstatante, ke tia eldiro kredeble donos la impreson, kvazaŭ la internacia helpplingvo esperanto estus socialist-tendenca, deziras akcentigi la fakton, ke la esperantomovado, la ĉi-landa kaj alilanda, estas tute neŭtrala rilate al politiko kaj religio. La sola celo de la tutmonda esperantomovado estas propagandi la internacian helpplingvon inter ĉiuj rasoj, por ke ĝi plifaciligu internacian komercon, vojaĝadon kaj interkomunikiĝon kaj kunigu la diversajn homajn rasojn en pli intimajn ligojn de amikeco kaj interfidemo.

"Estas unu alia punkto. Britaj esperantistoj antaŭenpuŝas esp-on pro nure patriotaj motivoj... ĉar ili deziras ne vidi la anglan lingvon ĝenerale uzata kiel internacia lingvo, kiu uzo nepre havus kiel rezulton ĝian kripligon kaj aliformigon, ĝis ĝi ĝus nura nombro de sia antaŭa memo."

"Tute neŭtrala rilate al politiko kaj religio"! Ĉi tion inter aliaj strangaĵoj diras la prezidanto de BEA. Eble estas vere pri la tutmonda movado, sed ĉiu estas simile vere pri BEA kaj ĝia prezidanto?

"Rilate al religio": Ĉu ne BEA estis oficiale responda pri la ĉiumonataj diservoj, kiuj okazis ĉe la Londona preĝejo de Sankta Georgo, Blumzbri (Bloomsbury)? "Rilate al politiko": Ĉu ne ŝajnas, ke la prezidanto kaj aliaj BEA-anoj atendis pretekston por preni la anglan movadon for de "neŭtralismo" en la manojn de la 1. kapitalista, 2. nacia, 3. kontraŭ-socialisma flanko? Ĉar —

1. (kapitalista) sinjoro Merĉnt starigas kiel unuan celon por la propagando komercon, kune kun, supozeble, la fi-profititoj de la hodiaŭa kapitalismo kaj ĝia ekspluatado al la laboristaro tutmonda. Ĉu estas sensignife, ke li starigas kiel unuajn celojn komercon kaj vojaĝadon — kaj, kiel la lastajn: amikecon kaj interfidemon?

2. (nacia) en sia lasta paragrafo la prezidanto de BEA sugestas, ke esp-o estas nur ilo por konservi pura lian nacian lingvon. Tion, kion Zamenhof iniciatis kiel grandan helpilon, — ni opinias —, al sennacieco, al nova senklasa socio, s-ro Merĉnt volas uzi "pro pure patriotaj motivoj". La ŝtuparon al larĝa internacieco la prezidanto misuzas por malsupreniri al mallarĝa nacieco kaj komercaj profitoj! Sed ni tute ne deziras malsupreniri kun li!

3. Per tiu letero ni vidas, ke s-ro Merĉnt kunigis sian voĉon kaj tiun de BEA kun la longdaŭra kriegado de la angla gazetaro kaj la angla et-burga klaso: "Ni ne estas socialistoj! Ni angl-oj ne estu socialistoj"! Ili fanfaronis sian nepartiecon, samtempe trudante, ke la angla popolo voĉdonu por tiu aŭ alia